# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 1 Januaro, 2014




*Kara Leganto, bonvolu pardoni min, Araneon, pro la prokrasto de kelkaj numeroj de (mi esperas) ŝatata de vi bulteno "Saluton!". Okazis tiel, ke la lastaj eventoj en mia kara Ukrainio tute forrabis min liberan tempon por servi al vi. Pardonu denove. La februara n-ro aperos post kelkaj tagoj kun kelkaj politikaj leteroj je la subteno de protestantoj sur la Majdano en Kijivo.*

*Nun – iom malfruaj novjaraj bonzeroj de nia malnova amiko Mikaelo Bruna Ŝtono, de ESF. Daŭrigante tradician poezian anguleton ni proponas al vi poemon de renoma sovetia (pola, ukraina) E-poeto E. Miĥalskij "Danco de skeletoj", kiu iomete respegulas la lastajn eventojn en Ukrainio. "Skeletoj", laŭ mi, estas membroj de partio de regionoj.*

*Atenton, la februara kunsido okazos laŭ la adreso: Cobbler Square, 1350 N. Wells St., Chicago, IL 60610 (stacioj de: Ruĝa linio – Division/Clark; Bruna linio – Sedgwick). Dankon al ĉiuj pro la kompreno kaj pacienco.*

–La Redakcio

## 2014 – la 127-a Jaro de la IL Esperanto

**Silentiĝas brueg' en la gaja salon',**
**Kaptas lastajn sekundojn krepusko enkorte**
**Haltis sled' de l' Novjaro ĉe l' festa peron',**
**Ĉar la tempo plu daŭras – senĉese, senmorte.**
**Refr.: Nia tempo – senhalta avi'**
**Eternejon fluganta defio,**
**Kaj Novjaro jubilas por mi kaj por vi,**
**Dum ni restas en tiu avio.**

**Gvato preskaŭ sopira, enpensa forkur' –**
**Adiaŭo kun jar', forfluanta el vivoj.**
**Spirohalta streĉiĝo, eksvinga susur' -**
**Jen abrupta impulso de l' sentoj naivaj.**
**Kaj ektinte pokalon salutas pokal',**
**Infanecan ekĝojon estingas nenio,**
**Kvazaŭ post la dekdua horloĝa signal'**
**Ĉies viv' komenciĝas de l' pura folio.**

***Sincere, Mikaelo Bruna Ŝtono***

## Jarfinaj Salutoj de ESF

En la finaj momentoj de la jaro oni emas retrorigardi kaj konsideri la eventojn de la jaro. Tiel, retrorigardante la agadon de ESF en 2013, ni volas sciigi kelkajn notindaĵojn:

Post iom pli ol jaro kiel prezidanto de ESF, alia grava rolo en la movado vokis al Mark Fettes, kiam li elektiĝis Prezidanto de UEA dum la Universala Kongreso en Rejkjaviko. Mark cedis la ĉef-postenon en ESF, sed daŭre kontribuos siajn saĝon kaj sperton kiel membro de la ESF-Estraro. Kiel novan prezidanton la ESF-estraro elektis d-ron Grant Goodall, kiu ĝis tiam estis vic-prezidanto de ESF. Grant estas profesoro pri lingvistiko kaj direktoro de la lingvo-programo de la Universitato de Kalifornio en San-Diego. En 2013 la ESF-estraro nomumis s-ron Charles (Karlo) Mays al la estraro. Longtempa ESF-subtenanto, Mays estis unu el la ĉeforganizantoj de NASK kaj la usona Esperanto-kongreso de 2013 en Raleigh, Norda Karolino. Laŭprofesie elektro-inĝeniero, Karlo portos al ESF sian multjaran sperton kaj scion pri projekt-mastrumado.

Samtempe la ESF-estraro perdis multjaran membron, d-ron Bonnie Fonseca-Greber, kiu devis demisii pro familiaj kialoj. ESF elkore dankas al Bonnie pro ŝia multjara servo kiel ESF-estrarano, kaj samtempe antaŭĝuas estontan kunlaboron kun ŝi, kiu daŭre servos al ESF kiel ano de la Konsilantaro.

**NASK en Kanado!**

La unuan fojon en sia pli ol 40-jara historio, la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) okazos ekster Usono. De la 30-a de junio ĝis la 7-a de julio 2014 NASK okazos en Viktorio, Brita Kolumbio, Kanado. Plenaj detaloj baldaŭ estos.anoncitaj! http://lodestone.org/nask/


Ekde la komenco de decembro 2013 venis ĉ. 5000 usonaj dolaroj da donacoj al ESF. Elkoran dankegon al ĉiuj donacintoj! Via subteno estas gravega por la daŭra sukceso de ESF-iniciatoj kiel lernu.net, edukado.net kaj NASK!

Tamen se vi ankoraŭ ne donacis al ESF, ne tro malfruas aldoni vian nomon al la listo de ESF-subtenantoj – klaku ĉi tiewww.esperantic.org/eo/donacoj/rete por donaci hodiaŭ!

Dezirante al vi feliĉan, sanan kaj pacan jaron 2014!

*–La ESF-Teamo*

# Esperanta Literaturo (2)



Hodiaŭ en nia jam tradicia rubriko estas prezentata poemo de Eŭgeno MIĤALSKI (1897-1937) poldevena ukraina E-poeto, aktiva en la laborista Esperanto-movado. Miĥalski naskiĝis la 21an de Januaro 1897 en Letiĉiv, Ukrainio. Esperantistiĝis en 1911, en 1917 li fondis la literaturan Esperanto-revuon Libera Torento, kie aperis liaj unuaj poemoj originalaj kaj tradukaĵoj. Li estis arestita en 1937 (marte) de NKVD pro senbaza akuzo pri partopreno en kontraŭsovetia trockiista organizo, kaj kondamnita al morto la 14an de Oktobro samjare. Li estis mortpafita la sekvantan tagon, kaj rehonorigita postmorte nur en 1958. Atentu, la poemo estis verkita la 25an de Novembro, 1917, tuj post la Oktobra renverso en Ruslando.

### ***Danco de Skeletoj***

*Skeletoj, skeletoj ĉirkaŭe. Mi volas forkuri, ne povas.*
*Skeletoj dentklakas, grimacas kaj en la dancado sin movas.*
*Jen ili jam estas proksime kaj manojn ostecajn eltiras*
*Kaj volas min kapti en brakojn, – mortecan malvarmon elspiras.*
*Skeletoj alpaŝas senĉese – Skeletoj ridetas rikane…*
*Mi falas silente genuen, mi provas forkuri, sed vane !*
*Mi rampas, sed estas malfrue. Min kaptas kaj premas teruro,*
*Skeletoj dancante alpaŝas, aŭdiĝas obtuza murmuro…*
*– "Ha, jen Vi! Vi volas Vin savi de nia kares', ĉirkaŭpreno?!*
*Sed ni Vin ekamis – deziras – kaj Ni ja al ni apartenos.*
*Ni montros al Vi novan mondon  ni donos al Vi la Potencon,*
*Esencon de l'Scio senfina – nur lasu la vivon sensencan;*
*Nin sekvu en mondon posttomban – en mondon de solaj spiritoj…*
*Decidu, Vi hom'! – Ni atendas. Kaj sekvu nin tuj senhezite.*
*– "Ne, ne! Mi ne volas, foriru! Deziras mi vivi ankoraŭ.*
*Mi amas la vivon kun ĝia sufero kaj akra doloro.*
*Se estos mi eĉ malfeliĉa – se premos min la efektivo.*
*Mi restos ĉi tie sur tero; – ne lasos mi kampon de l'Vivo.*
*Eĉ malgraŭ kruelaj ekbatoj de la Realeco sensenta,*
*Eĉ malgraŭ solec' de l'animo kaj malgraŭ de l'mensa turmento."*

---

Skeletoj ekhaltis momente en sia senĉesa almovo.
Sed tuje jam grincas, rikanas kaj dancas, dancadas denove.

# Esperanto-kastelo Greziljono en 2014

Apr-19/26: FRINGOJ, renkonto inter grupoj de esperanto-lernantoj kaj iliaj instruistoj.

Apr-26/Maj-04: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj en 3 niveloj, internaciaj KER-ekzamenoj B1-C1. Rete: gresillon.org/printempo

Maj-08/11: Kantado de korusaro Interkant'

Maj-11/17: Renkonto de rememoroj inter malnovaj esp-istoj kaj iamaj gastoj de Greziljono. Rete: gresillon.org/s1

Jun-29/Jul-06: Turisma semajno, tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj rezidejoj de renesancaj artistoj. Rete:gresillon.org/s2

Aŭg-01/09: Sennacieca semajno kun kursoj, ekskursoj kaj prelegoj, antaŭ SAT-kongreso. Rete: gresillon.org/s3

Aŭg-09/17: Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, SAT-Infankongreseto. Rete: gresillon.org/s4

Okt-24/Nov-01: AUTUNE, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj.

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

28an de Januaro – La kunsido okazos laŭ adreso: Cobbler Square, 1350 N. Wells St., Chicago

25an de Februaro – Tina prelegos pri la vojaĝo tra Georgio, Norda kaj Suda Karolinoj. La kunsido okazos laŭ adreso: Cobbler Square, 1350 N. Wells St., Chicago

25an de Marto – Poezian vesperon, dediĉita al 200-jara datreveno de la plej fama ukraina poeto Taraso Ŝevĉenko, gvidos Araneo